



MARTINUS
INSTITUT

Kosmos

LA KOSMOLOGIO DE MARTINUS

Martinus:

La nova mondkulturo
post ragnaroko

Martinus:

La leĝo de la vivo –
amu unu la alian

Astrid Ryboe:

Al kongreso en Parizo
1914

Ole Therkelsen:

Profetaĵoj pri
Martinus 4.
Nostradamus

Erik Gerner

Larsson:

Martinus 12, La
akceptemo de
la homaro rilate al la
nova mondimpulso 4

Hokan Lundberg:

Kiel Martinus verdigis
mian vivon



Nova mondo post kataklismo kaj ragnaroko

En la unua artikolo 90-jara Martinus pritraktas la novan mondkulturon post kataklismo kaj ragnaroko, kiu komenciĝis per la unua mondmilito kaj daŭros ĉ. 200 jarojn.

Ni eniris la jaron, kiu prezentas sin pri rememoroj de la eksplodo la unua mondmilito en 1914. Pluraj libroj pri tiu temo jam estas eldonitaj. En la dua artikolo de 1934 Martinus skribis pri la unua mondmilito. (La leĝo de la vivo – amu unu la alian, simbolo n-ro 44 en *La Eterna Mondbildo* n-ro 4). En 1935 en ĉapitro 21 en libro n-ro 5, *La ideala nutraĵo*, Martinus ligas la unuan mondmiliton al kolero en menso de la viva terglobulo.

La unua mondmilito komenciĝis sabaton la 2-an de aŭgusto 1914 – ĝuste en la tago de la malfermo de 10-a Universala Kongreso en Palaco Gaumont en Parizo. En la arkivoj de Dana Esperanto Asocio estas raporto, en kiu Astrid Ryboe tre vive rakontas pri la tagoj en Parizo. La milito estis deklarita, kaj pere de ŝia raporto ni povas tralegi kaj travivi la malfacilaĵojn, kiujn ŝi kaj la kongresantoj travivis. – La 28-an de julio la geedzoj Zamenhof volis vojaĝi de Varsovio al Parizo, sed en Kolonjo (Köln) ili estis haltigitaj, kaj ili tuj devis forlasi Germanion. La germana-rusa landlimo ankaŭ estis fermita. Ili reverturis al Berlino kaj devis entrepreni la longan vojaĝon tra Svedio–Finnlando–Peterburgo por reatingi la hejmon en Varsovio la 15-an de aŭgusto 1914.

Ole Therkelsen



La nova mondkulturo post ragnaroko

de Martinus



1. Pardonado estos la bazo de la nova kulturo

Estas dirite, ke oni pardonu al ĉiuj, sed per tio ne eblas komenci krei novan mondkulturon. Multaj homoj ne havas la inklinon pardoni, kaj ja estas klare, ke ne povus esti en alia maniero. Sed pardonemo estas la esenca punkto en la kompleta forigo de venĝo kaj armiloj. Kompreneble oni tion longe diskutos. Homoj diros ke oni ja ne povas rezigni je armiloj, sed oni povas. Ĉia armila produktado, ĉia milito, ĉia venĝo malaperos. Fariĝos granda transformiĝo, la plej granda kiu povus okazi al la popolo de la Tero.

Kial oni ne povus krei “kulturon de pardonado”, same kiel oni povas krei “kulturon de ne-pardonado”? – kompreneble oni same bone povas krei mondon aman, kiel mondon diablan. Ambaŭ devas kreiĝi, alie oni ne povus ion percepti. Se oni ne mem travivus la mallumon, oni ne havus ĝin kiel sperton. Tiel longe ke oni nur aŭdis pri ĝi de aliaj, kiuj rakontis pri ĝi, oni ja ne estas tre multe progresinta. Estas ja miloj da homoj, kiuj estas tre humanaj, sed kiuj ankoraŭ ne finspertis trinki alkoholaĵojn, fumi cigaredojn kaj ĉion tian. Tio postulas tempon, sed ili dekutimiĝos de ĉiuj tiuj malbonaj kutimoj.

2. Dum la venonta ragnaroko, la morto povas esti savo

Tiuj homoj kiuj atingis stadion en kiu ili ne plu ŝtelas, murdas, militas kaj faras malbonajn agojn, ne bezonas timi ragnarokon. Tio ne signifas, ke ili ne povas esti trafitaj de la morto, ĉar tio ja povas esti ilia sola maniero saviĝi. La morto ja estas naskiĝo. Kiam ragnaroko furiozas, domoj disfalas, vulkanoj erupcias kaj ĉio falas, en multaj okazoj, tiuj al kiuj la karmo ne estas destinita, ne povas saviĝi alimaniere. Estas ja tiel multaj kiuj loĝas unu apud la alia. Iu eble havu teruran karmon, dum la aliaj tute ne bezonas tiun karmon ricevi. Tiel ja povus ekesti maljusta sorto. Sed ja estas tiel, ke la morto estas same bona savo, kiel ĝi estas fino de la fizika vivo.

Ekzemple, imagu, ke viro kiu devas soldatiĝi estas tute kontraŭ mortigado, sed li estas devigata partopreni la militon. Tiam tre ofte okazas, ke li estas pafita por saviĝi. Ĉar per tio, li eniras pli altan mondon, kie li ne devas mortigi. Tia viro, kiu eniras tiamaniere, ja estas ege en la lumo en la alia sfero. Pro tio, granda kvanto da homoj saviĝos de ragnaroko per tio ke ili mortos. Tio eble sonas strange. Estas tiel multe, kio kaŭzas skeptikemon, sed mi estas devigita tion diri, ĉar tiel estas. Estas ja evidentege, ke tiuj, kiuj ne havas malhelan karmon por ricevi, ankaŭ ne ricevu ĝin. Kaj kiel alie oni povus disigi ilin unu disde la alia? –

3. Kulturaj medioj por homoj kiuj ne estas evoluintaj por vivi en la normala kulturo

En la nova mondepoko oni devas fari apartigon disde la homoj kiuj ne estas sufiĉe evoluintaj por vivi en la normala kulturo. Oni faru kulturan medion, adaptitan al ilia malpli alta stadio, tiel ke ili povu senti sin normalaj. Sed ili devas esti sub kontrolo, tiel ke ili ne havas okazon murdi, mortigi, fari seksajn krimojn kaj ĉion tian, pro kio oni nun punas homojn. Sed ne estos tiel multaj en la nova mondepoko. Tiuj kiuj ne povas pliboniĝi pere de la ragnaroko, ja ne plu naskiĝos ĉi tie sur la tero, ĉar ili ne povas veni en kontakton kun la kristokonscio, aŭ la pli alta sfero en kiun la tero leviĝos. Multaj homoj ja ŝanĝos sian direkton, sed ankaŭ estas multaj kiuj estas tiel malmulte progresintaj, ke ragnaroko ne faras grandan diferencon. Kaj tiam ili devas daŭrigi sur planedo, kie ili povos sperti pli da ragnaroko.

Ankaŭ mortigaj kaj al homoj danĝeraj bestoj malaperos al aliaj planedoj, kie ili apartenas.

4. La loĝad-cirkonstancoj de la estonteco

La Tero havos malpli grandan popolon post ragnaroko. Ankaŭ naskiĝos malpli da infanoj, laŭ la progreso de la polusa transformiĝo. Kiam la nova mondregno proksimiĝas, malmultiĝos ankaŭ la nombro da geedzeco, ankaŭ la neformaligitaj, pro tio ke viroj kaj virinoj fariĝos pli similaj. Oni ne parolos pri viroj kaj virinoj, sed pri homoj.

Ĉiuj tiuj dupolusaj homoj ne loĝos en propraj domoj, sed konstruos grandajn palacojn, kie ili organizos komunajn aranĝojn, manĝadon, distradon, kaj kinetojn. Estos komune kaj kostos multe malpli.

Hodiaŭ multaj mortas pro malsano, sed tiutempe ĉiuj atingos altan aĝon,

ĉar ili vivas sane. La manĝaĵo ĉe la komuna manĝado en la komunaj palacoj estos farita kongrue kun la plej altaj sanpreskriboj, kiuj baziĝas sur la plej altaj spiritaj travivaĵoj.

En la estonta ŝtato, oni ne loĝos en urboj, sed en grandaj palacoj ĉirkaŭitaj de grandaj parkoj arbaroj. Kaj ne impresos kiel urboj kun mizerulaj kvartaloj. Estos aranĝite laŭ la plej alta perfektigiteco.

5. La laboro kaj administrado en la estonteco

La kampoj ne estos kultivitaj por doni furaĝon al la brutaroj, sed por doni manĝaĵojn al la homoj. Ankaŭ venos plantospecioj hodiaŭ ne konataj.

La krudajn formojn de laboro, kiuj ekzistas nuntempe, oni adiaŭos. Estos nur tio, kio facile fareblas. Ne eblos tro-labori. Dura laboro ne ekzistos, ĉar oni kreas maŝinojn kaj komputilojn, kiuj povos ĉion produkti. Survojas inventaĵoj, kiujn oni hodiaŭ eĉ ne povas koncepti.

La homoj ricevos sian heredon rajton je la tero. Sed ne en tiu maniero, ke ĉiu unuopa persono ricevos pecon da tero. Estos administrata de komuna aŭtoritato. Estos kalkulite, kiom vivado de ĉiu unuopa homo kostas, kaj kiom da laboro estas bezonata, por havigi bonan vivnivelon. Sekve ili ricevos laborkarton, kun tiu indiko.

La vivnivelo de la estonteco estos pli alta ol eĉ tiu nivelo, je kiu vivas hodiaŭa milionulo, do ne mankos io ajn. Se oni ekzemple imagas ke persono laŭ la aktuala vivnivelo havas unu aŭton – se ili tiutempe entute uzos aŭtojn, kion mi iom pridubas – kaj dezirus havi plian, tio facilas. La labor-aŭtoritatoj scias kiom kostas aŭto. Ĝi kostas eble du aŭ tri laborhorojn, kaj do sufiĉas labori tiujn kromajn horojn. Nenio mankas, la Tero estas nemezureble bonhava.

Ne estos mono. Estos nur la labor-karto, kaj ĝin oni ne povas vendi, ĝi similas al pasporto, kiu validas nur por la koncerna persono.

6. Materiigo kaj demateriigo

La mondregno, kiu estas priskribita en la kvara ĉapitro en Livets Bog (La libro de la vivo), estas, por tiel diri, la pordo al la vera regno, la spirita regno. Antaŭ ol oni alvenos al la vera regno oni ja venas al la spirita sfero inter al vivoj, sed tiam temas pri la malpli evoluintaj terenoj, kie oni estas por havi travivaĵojn, ripozi kaj fortiĝi, antaŭ ol denove naskiĝi.

Kiam la homoj atingos la mondregon, ekaperos la unuaj kiuj venos en la mondon sen naskiĝi, per materiigo. Tie oni do povas vidi spiritojn kaj homojn sidi ĉe la sama tablo kaj interparoli. Tie la fizika mondo altgrade eniras en la spiritan mondon, kaj tie ili ekhavos kosman konscion kaj fariĝos kristoestuloj.

Tiutempe ĉiuj estos grandaj artistoj. Tiuj, kiuj ne havas kosman konscion, survojas al tio, kaj estas facile survoji al tio, kiam oni estas ĉirkaŭata de tiom da altaj estuloj. Oni vidas ilin ekaperi, vidas ke ili sin materiigas kaj demateriigas. Tiel malaperos la skeptikemo, kiu povus ilin reteni.

7. Skeptikemo estas granda obstaklo kontraŭ la povo fari miraklojn

Estas tiu ĉi enorma skeptikemo, kiu kulpas je tio ke la homoj ne povas fari miraklojn kaj tiajn aferojn. Tio estas, ĝi estas parto de la kaŭzo, ĉar eĉ sen la skeptikemo, ili ankoraŭ ne estus sufiĉe evoluintaj por povi tion fari. Sed skeptikemo estas granda obstaklo por tiuj, kiuj komencas povi fari miraklojn. Temas pri tio, ke ili ne povas kredi ke tio eblas. Kristo diras: “Estis via kredo, kiu helpis vin”. La tutan tempon li

instigas kredi. Li ja devus tion scii, ĉar li sciis ke li povas tion fari. Li ne havis skeptikemon. Tial li sciis ke la maro lin aŭskultos, ke li povos nuligi la graviton. Kiam la mio en la homoj ricevos sian tutan potencon, ĝi fariĝos mastro de ĉia movo. De la mio deiras ĉiu movo en la vivo, kaj per ĝi oni povas klarigi ĉiujn miraklojn. La mio en la vivaj estuloj ja havas la tutan potencon, kiam vi estas fariĝintaj kristoestuloj.

8. La unuaranga konscio de Dio

En la spirita sfero oni havos milionjaran estadon, se entute oni povas tion esprimi per nombroj. Tie vivas ĉiuj tiuj estuloj kiuj estas fariĝintaj kristoestuloj. Ili ne havas specifajn korpojn. La korpo ekaperas je la penso, kaj, por tiel diri, ne estas interspaco inter la mioj, ili ĉiuj estas centroj en la mio de Dio. En tiu sfero, kie hejmas la kristoestuloj, estas kvazaŭ la aŭreoloj estas kunligitaj. Ili ja ĉiuj havas ĉiopovon, ĉioscion kaj ĉioamon. Ili kune tion konsistigas. Kaj tio estas Dio kaj tial Dio estas ĉie ĉeesta.

La homoj jam estas la cerboĉeloj de la terglobo, sed ili do fariĝos la konsciĉeloj de Dio. Tie ili restos dum treega longa tempodaŭro, antaŭ ol trairi la beatoregnon kaj naskiĝi en nova spiralciklo, kie ili ankoraŭfoje kreskos. En ĉiu spiralciklo, ili spertas la kulminon de la mallumo, kaj poste la kulminon de la lumo, kaj poste ili refoje eniros novan spiralciklon, kaj tiumaniere ĉio estas uzata.

La eterneco ne ekzistas kiel malplena ĉambro, kie estas nenio. Planedoj kaj steloj ne kreiĝas el nenio per eksplodo en malplena spaco. Ne, la spaco estas plenigita! – Kiel infano mi pensis: “Mi scivolos, kio ĝi estas – la tuta mondo” – Sed ĝi do estas eterna realaĵo, eterna viva estulo. Kaj ĉi tiu viva estulo estas tutan tempon ĉioscia, ĉiopova kaj

ĉioama, ĉar ĝi en sia unuaranga konscio nur havas estulojn el tia alta konscio. Ili kreskas kaj ekhavas ĉi tiun ĉioscion, ĉiopovon kaj ĉioamon, kiam ili fariĝas kristoestuloj, kaj tiam ili konsistigos la unuarangan konscion de Dio, ĝis kiam ili komencos denove degeneri. Ĉi tiu ciklo garantias, ke la konscio de Dio ĉiam estas je plena kapacito. Ne estas kiel pri ni aliaj. Ni havas tempon, kie ni devas esti for, dum kiu ni iru malsupren por denove lerni. Sed la konscio de Dio seninterrompe funkcias centelcente perfekte, kaj tial estas egale, kie oni preĝas al Dio, ĉar Dio estas ĉie – en ĉiuj homoj, en ĉiuj plantoj, en ĉio.

La artikolo baziĝas de entajpita sonregistraĵo de eldiroj de Martinus dum konsilia renkontiĝo malpli ol tri monatojn antaŭ lia forpaso la 8-an de marto 1981. Ĉar li tiutempe ne atingis multon verki, Martinus konsciis ke tio, kion li diris registriĝu, tiel ke ĝi poste estu utiligebla. Prilaboris la entajpitan registraĵon, aldonis titolon kaj alineajn titolojn Ole Therkelsen, kaj la tekston aprobis la konsilio 2004.04.06. La artikolo aperis unuafoje en dana Kosmos n-ro 8, 2006.

Eldanigis Henning Sato von Rosen helpe de Javier Romero Tello kaj Hokan Lundberg en 2014



© Martinus Institut 1981

Reg. 44

Simbolo n-ro 44 *Amu unu la alian [Elsker hverandre]*

La leĝo de la vivo – amu unu la alian

de Martinus



1. La tero – ŝipo sur la senfina maro de la eterno

Sur la grandioza maro de la eterno moviĝas eta ŝipo. Ĝi vojaĝas en la spaco. Ĝi ŝvebas inter la steloj. Ĝi moviĝas en la “ĉielo”. Tiu eta ŝipo nomiĝas “la tero”. Ĝiaj plej eminentaj pasaĝeroj estas homoj. Sed ĝi havas ankaŭ aliajn pasaĝerojn, nome ĉiujn ceterajn vivajn estulojn, kiuj apartenas al la teraj formoj de vivo. Ĝi estas speco de “Arkeo de Noa”. La menciita ŝipo sekvas difinitan vojon, kiu etendiĝas same malproksimen kiel “la maro”. Tiu vojo nomiĝas “la tempo”. Kaj la tempo kaj la eterno sekve estas same etenditaj. Sed kiel ĉiuj aliaj trafikataj vojoj aŭ ordinaraj vojoj, la tempo estas dividita en mezurunuojn. Tiujn mezurunuojn, kiujn la tera homo komprenas kiel markofostojn en sia kosma vojaĝo, ni konas kiel: jarojn, monatojn, semajnojn, tagojn, horojn kaj sekundojn. El ili la jaroj estas la plej bazaj por tiu estulo. Tiel ĉiu “novjaro” estas baza “mejloŝtono” en la terhoma vojaĝo per la tero tra la spaco. Kompreneble troviĝas multaj markofostoj por multe pli grandaj mezurunuoj aŭ distancoj en tiu vojaĝo, ekzemple: jarcentoj, jarmiloj, jarmilionoj. Sed tiaj estas destinitaj por la “ĉielaj vojaĝantoj”, kiuj atingis vivi sur konscinivelejo, kie mil jaroj estas kiel unu tago, kaj unu tago kiel mil jaroj (2. Pet. 3.8). Kaj de tiu speco de “pasaĝeroj” troviĝas ankoraŭ treege malmultaj sur la tero. Por tiuj vojaĝantoj ĝi estas ankoraŭ tro primitiva transportilo. Ĝi ankoraŭ ne havas por tia konscistato sufiĉe komfortajn “salonojn”

aŭ “kajutojn” taŭgajn por la vera homa manifestado, aŭ por estuloj vivantaj kaj perceptantaj ekskluzive pere de “la sankta spirito”. Ili ankoraŭ ne estas sufiĉe komfortaj por estuloj, kiuj antaŭ longe en maskla kaj femala ekvilibra polusunuiĝo forlasis la zonon de la mambesto, kaj kiuj kiel perfektaj “di-homoj” releviĝis en “tiun regnon, kiu ne estas el ĉi tiu mondo” (Joh. 18.36). Tiuj estuloj havas siajn specialajn “ŝipojn”, belajn kaj lumajn mondojn, oazojn inter sunoj, harmoniojn en koloroj, brilo kaj amo.

Por la tero estas alie. Ankoraŭ ĝi ne estas konstruita por la “ĉielaj vojaĝantoj” de tia rango. Ĝiaj plej eminentaj ĉambroj estas ankoraŭ kompareblaj nur kun “staloj”, ĉar ili estas destinitaj por estuloj kun parte besta konscio. Pro la vira kaj ina individua forto en la zono de la mambesto tiuj estuloj povas nature vidi sian “proksimulon” nur en la mala sekso, kaj sekve nur rilate al ĝi ili povas praktiki iom de la plenumo de la granda ordono: Amu unu la alian (Joh. 15.12), aŭ ili povas, same kiel la bestoj, ankoraŭ kompreni la amon nur pere de geedzeco, idoj kaj familio, kaj ili povas sekve travivi la amon nur en formo de “ĝermo” – ne en formo de “floro” aŭ kulmino. La plej eminentaj “pasaĝeroj” de la tero devas ankoraŭ esti en la sama loko kiel la bestoj, devas ankoraŭ “manĝi kune kun la porkoj” (Luk. 15.16). Ankoraŭ la tero estas “ŝipo” nur por nefinaj estuloj, “perditaj filoj” (Luk. 15.11-32), sed ĝi troviĝas en vojaĝo en la “ĉielo” kun kurso al la eterna Patro.

2. La luma brilo de la dia kreoprincipo

En la tempo kaj spaco la tero do ŝvebas kiel eta stelo. Kiel antaŭe menciite, ĝia kurso en la eterno estas direktita al la eterna Patro, la centro de la mondo, la “fiksa punkto” de ĉiuj fenomenoj. Kiel celon ĝi havas harmonion kaj amon. Ĝi proksimiĝas pli kaj pli al la lando de la vera feliĉo. Tio necese kaŭzas, ke ĝia spirita atmosfero estas influata de tio. Tiu influo ja montriĝas kiel “la hela brilo de la dia kreoprincipo”, kiu estas traktita en “Livets Bog” (La Libro de la Vivo). Kaj en sia kosma vojaĝo antaŭ ĉ. dumil mezurunuoj aŭ “novjaroj” la tero atingis en sia kosma vojaĝo la unuajn malfortajn lumbrilojn de glorita lando. Tiuj lumbriloj de la malproksimo, kiuj ĵetis sian brilon sur la teran “ĉielŝipon” en formo de la tri grandaj mondreligioj, “Budhismo”, “Kristanismo” kaj “Islamo”, fariĝis la plej grandaj informaj faktoroj de la menciita ŝipo, kaj fariĝis bazaj aŭguroj pri “la lando de la promeso” malproksime antaŭe. Ili fariĝis videblaj pruvoj pri la vojaĝo de la tero al la centro de la mondo, al la origino de la kulturo kaj civilizo, al la fonto de ĉiaj harmonio, feliĉo kaj amo. La menciitaj religioj sekve estis la plej malproksimaj postenoj de glorita zono, la videblaj indikiloj de la kurso de la tero pli kaj pli proksimiĝanta al la regno de la lumo, al la suno de la sunoj.

3. La fonto de la lumo, kaj la ombra flanko de la tero

En formo de la tero la malgranda ĉiela ŝipo estis do dum la lastaj jarmiloj konstante en la lumbrilo de la regno de la Patro. Tio tamen ne malebligis, ke dum jarmiloj pli frue en la estinteco tiu ŝipo havis en formo de elstare alta kulturo eĉ tre fortajn ekbrilojn de tiu dia atmosfero. Sed tiam ĝi estis ankoraŭ tro longe for de la centro de la lumo. Densaj “kosmaj nuboj” amasiĝis kaj forbaris la lumon. Kaj denove la tero ŝipis en mallumo, nur

de tempo al tempo malforte lumigita de la “memoroj” de la estinteco. Kiel fragmentoj en tre korodita aŭ mallumigita formo, tiuj “memoroj” estas rimarkeblaj ĉe la primitivaj naturhomoj en iliaj moralo kaj imagoj pri la vivo.

Sed nun la tero atingis tiel proksimen al la fonto de la lumo, ke ne plu iuj kosmaj nuboj povos tute forbari la lumon. Neniam plu en ĉi tiu spiralo la tero povos moviĝi tute en mallumo. Sed tio kompreneble ne signifas, ke per tio la homoj liberiĝis de ĉio, kio havas malagrablan naturon, male. Ju pli la tero proksimiĝas al la lumo, ju pli lumigita ĝi estos, des pli montriĝos, kiel neperfekta ĝi estas. Fenomenoj, kiuj antaŭe en la mallumo ŝajnis tre utilaj, ravaj kaj agrablaj, nun en la komenciĝanta lumo montriĝas de tempo al tempo plej altgrade damaĝaj kaj subfosaj. En la mallumo de la estinteco oni ekzemple konsideris konkeron, mortigon, militon kaj venĝon la plej alta celo de la homaro, la plej alta kaj plej bela senco de la vivo. Sed en la lumo tiuj realaĵoj montriĝas la aktivigaj faktoroj por ĉio apartena al la nocio “malfeliĉa sorto”, ĉio, kio estas sufero kaj doloro. Tiel la “paradizo”, kiun oni imagis en la mallumo, aperas en la lumo kiel “infero”.

Ne povas okazi tre grandaj harmonio, feliĉo kaj ekvilibro sur la tero tiel longe, kiel ĝia pasado troviĝas en tia stato de malkovro, kaj tio ja ne estas malfacile komprenebla. Ĉiu objekto havas ja ombran flankon, kiam en distanco ĝi estas lumigita de lumfonto, kaj tiel ankaŭ la tero havas ombran flankon, nome tiun turnitan al la mallumo, aŭ for de la spirita lumbrilo antaŭe en ĝia kosma kurso. Kaj estas evidente, ke tiuj “pasaĝeroj” sur la tero, kiuj havas siajn lokojn sur tiu parto de “ferdeko” aŭ “kajuto”, kiu frontas al la lumo, estas influataj de la malkovroj. Per tio ili ricevas alian koncepton pri la tero kaj la vivo ol tiuj, kies lokoj troviĝas sur tiu parto de la “ŝipo”, kiu estas en la mallumo aŭ for de la lumo. La

opinioj pri tio, kio estas perfekteco, kio estas “infero”, kaj kio estas “paradizo”, nepre necese fariĝas malsamaj. Tiel la pasaĝeroj havas tute malsamajn opiniojn pri ĉiuj fenomenoj. Tio validas ekde la plej etaj ĝis la plej grandaj detaloj de la vivo, ekde higieno, nutraĵo kaj vestoj ĝis la koncepto pri la grandaj problemoj de la vivo mem, la leĝo de la vivo, senmorteco, moralo kaj proksimula amo. Sed kiam la konceptoj estas tiel malsamaj, do ĉia formo de paco, harmonio kaj ekvilibro estas nuntempe senbazaj sur la tero, aŭ estas senbazaj ĝis en sia ĉiela veturo la tero atingos tiom en la lumon, ke tiu ĉirkaŭos ĝin sur ĉiuj flankoj, kaj ke sekve neniu “pasaĝeroj” troviĝos en mallumo. Kaj la ebloj de paco fariĝis preskaŭ malpli grandaj en la plej lastaj jaroj, ĉar nuntempe la tero glitis en novan grandan kosman lumondon de la venonta dia regno. La renkonto de la tero kun tiu lumondo ja estas dumil mezurunuojn pli proksima al la lumfonto, ol estas ĝia renkonto kun la lumondo de la religioj, kaj tial la unue menciita lumondo ja havas multe pli grandan forton, multe pli grandan brilon ol ĝi. Per tio estiĝos multe pli granda kontrasto inter lumo kaj mallumo. Tio, kio en la lumondo de la religioj aspektas perfekta, nun ofte en la nova lumondo aŭ mondimpulso montriĝas neperfekta. Tio, kio aspektas kiel tre malgravaj kaj sen signifaj detaloj en la brilo de la religioj, kelkfoje en la pli forta lumo montriĝas aŭ malkovriĝas kiel grandaj decidaj realaĵoj en la sortoformado de la unuopaj individuoj, montriĝas kaŭzo de iliaj grandaj malfacilaĵoj aŭ suferoj. Kaj samgrade kiel la kontrasto inter lumo kaj mallumo tiel fortiĝas, ankaŭ la maltrankvilo kaj malharmonio inter la “pasaĝeroj” de la tero fortiĝas. La batalo inter lumo kaj mallumo kreskis kaj fariĝos ankoraŭ multe pli fortega laŭ tio, ke la tero pli kaj pli proksimiĝas al la plej alta lumfonto de la universo. Sur la kontinentoj de la tero la sango fluos denove. Grandaj

diversspecaj opinioj pri lumo kaj mallumo kreos konfliktojn inter la homoj. Ĉiuj kredas, ke ili laboras serve al feliĉo kaj lumo, kaj ĉiu por si ili uzas siajn tutajn energiojn kaj forton por realigi siajn ideojn kaj planojn. Multaj politikaj kaj religiaj partioj estiĝas, kaj ĉiu unuope ili kredas esti ĝuste tiu aparta speciala bonaĵo, kiu savos la homaron el ĝiaj nuntempaj kaoso kaj erarvagintaj statoj. Sed la ideoj de la malluma flanko estas ankoraŭ tro dominaj, kaj ili krome fortigas sin laŭ tio, ke la luma flanko fariĝas pli kaj pli forta. Ankaŭ tie validas la leĝo de la naturo: Ju pli forta lumo des pli forta ombro. Sed iom post iom la lumo proksimiĝos tiom, ke la ombra flanko tute malaperos. Kaj la malluma flanko kvazaŭ sentas, ke ĝia pereco proksimiĝas, ja ĝi eĉ jam komencis realiĝi en speco de mortobatalo. Iom de ĝi ni jam spertis pere de la okazaĵoj en la jaroj 1914-18. Milionoj da animoj en la mondo havas tiajn spertojn. Dum kvarjara punkto de teruro ili spertis “inferon” en pura formo. Sed post tiu malluma punkto la lumo denove trapenetris. Sed la mallumo ne estis forigita, ne estis venkita. La tero estis ankoraŭ tiel longe for de la granda lumfonto, ke la lumo ne povis vere superi la ombran flankon. “Infero” estis daŭrigata sur la tero en novaj formoj. Grandiozaj energioj aŭ fortoj de la malluma flanko floras fekunde. Novaj efikegaj mortigiloj estas inventitaj. Nuntempe la tero estas ekipita por povi manifesti la mortigan principon en tiel vasta pura formo, kaj kun tiel grandega forto, ke sur sia kosma vojo en la spaco ĝi neniam renkontis ion nur iomete similan. La diluvo kaj la mondmilito estas nur bagateloj kompare kun tiu manifestado de mallumo, kiu nun povos realiĝi sur la tero, kaj kiu efektive atendas nur la aktivigan faktoron por manifesti sin kiel “ŝteliston en la punkto” (Mat. 24.42-44). Tial la parabolo pri “la dek virgulinaj” (Mat. 25.1-13) validas pli por hodiaŭ, pli por la nuna tempo ol por iu ajn alia

tempo en la historio de la mondo. “Vi ne scias la tagon nek la horon” (Mat. 25.13). – Sed la tempo estas proksima. La morto, la malfeliĉo kaj la suferoj havos denove grandan rikolton sur la kontinentoj de la tero, kaj la plorado kaj la grincado de dentoj kulminos denove (Mat. 13.50). Tial la dia averto “Viglu kaj preĝu, por ke vi ne eniru en tenton, la spirito ja estas fervora, sed la karno estas malforta” (Mat. 26.41), sonoregu en la mondo kun nova forto. Ĝi devus sonoregi pere de la radiofonio tra la tuta mondo, ĝi devus esti aŭdebla eĉ al la vilaĝetoj de la zuluoj kaj al la branĉaj kabanoj de la fajrolandanoj, kaj tute supren al la plej nordaj loĝlokoj kaj glacidezertoj, kiel ankaŭ tra la Oriento kaj Okcidento. Ne povas sonori tro forte, ke la tero rapidas al “la fino de la mondo”. Ĉiuj estu pretaj (Mat. 24.44). Granda plano en la dia mondarango devas realiĝi al perfekteco. La tero ĵetiĝos sur novan kosman vojon, kie ĉio, kio ne estas “pura” kaj ama, restu ekstere. La fortaj vibroj de la zono de la Patro dissolvos ĉiujn detalojn, kiuj ne estas izolitaj en amo.

4. Amu unu la alian – la granda ordono de la amo

La homaro armas sin por bataloj, mortigado kaj kripligado, la “pasaĝeroj” de la malluma flanko preparas sin por ne altorni ankaŭ la alian vangon, kiam ili estas frapitaj sur la dekstra (Mat. 5.39), preparas sin por ne cedi al sia proksimumo, sed male igi lin sklavi kiel eble plej multe por konservi sian propran vivon en lukso kaj ĝojo je la kosto de sano kaj moveblo, feliĉo kaj bonfarto de aliaj, kaj krome por venĝi, malami kaj persekuti kiel eble plej multe ktp. Dum tio la tero, kiel jam menciite, moviĝas en novan grandiozan kosman lumondon, kiu de “la zono de la Patro” ĵetas siajn radiojn antaŭen tra la spaco. Tiu

lumondo progresigos la evoluon de la tero. Sed progresigita evoluo signifas fortigitan suferon. La homoj de la tero ricevos la restantan parton de siaj suferoj, kiuj estas la revenantaj efikoj de tiuj kaŭzoj, kiujn ili estigis per sia erara vivmaniero. Tio okazos koncentrita en iom mallonga tempoperiodo. Per tio la suferoj fariĝas pli fortaj ol ili fariĝus, se la realigoj okazus dum pli longa tempo. Sed kompanse tio kaŭzas, ke ankaŭ la kurso de la tero al la regionoj de la lumo estos progresigita, kaj sekve la ĉiela ŝipo de la homaro atingos “ekvidon” de “la lando de la promeso” en la daŭro de malpli ol tri jarmiloj, sed ĝi atingos ankaŭ tiom en ties lumregionojn, ke tiam la plej granda parto de la ombraj flankoj estos forigita. Tiam la tero estos preterpasinta la bestan zonon, la mortigan principon, kaj ĝi ne plu estos transportilo de malfeliĉo, malsano kaj kripligado. Sed pere de sia finfarita pasado tra la zono de sufero ĝi fariĝis kosma “ŝipo” kun “diaj vojaĝantoj”, kiuj “finfaris la veturon”, atingis la saĝon, fariĝis unu kun la Patro (Joh. 10.30).

Tial ni bonvenigu la novan jaron pensante pri tio, ke per la fino de la malnova jaro la tera homaro proksimiĝis je unu mezurunuo al la regionoj de la feliĉo, kaj ke malgraŭ nuntempaj kaj proksimiĝantaj suferaj statoj ĝiaj individuoj tamen estas “ĉielaj vojaĝantoj”, senmortaj “pasaĝeroj” sur stelo en stelmondo kun kurso al la pinto de la vivo, lumo kaj feliĉo. Kaj jam nun super la malluma tero, super la malluma bestoregno, komencis de la malproksima horizonto antaŭ ili brilegi kaj elradii atmosfero de lumo, kiu vibras ekskluzive en la granda ordono de la amo: “Amu unu la alian”.

La artikolo aperis unufoje en dana Kosmos n-ro 1, 1934. La leĝo de la vivo – amu unu la alian, simbolo n-ro 44, estas lastfoje publikigita en La Eterna Mondbildo, volumo 4. Traduko Ib Schleicher, 1998.



Al kongreso en Parizo 1914

de Astrid Ryboe

Supozeble estas nun ĝenerale konate, ke la Deka Universala Kongreso, kiu devus okazi en Parizo 2-10 de aŭgusto 1914, kaj pri kiu ni atendis grandan sukceson, ne okazis pro la malfeliĉa milito.

Mi vojaĝis al Parizo semajnon antaŭ la malfermo de la kongreso, ĉar kvankam la politika situacio certe tiam estis kriza, neniu tamen atendis, ke la “fulmotondro” koncentriĝos tiel rapide, ke nia Esperanto-kongreso eĉ ne okazos. – Multaj samideanoj jam alvenis al la mondourbo, kaj kiam “stelanoj” renkontiĝis, la demando inter ili ĉiam estis: Kion vi opinias rilate al nia kongreso? – La plej multaj opiniis, ke certe nia kongreso okazos, sed ke multaj el la 3700 anoj, kiuj aliĝis al la kongreso, estos devigataj resti hejme pro la kriza epoko. La 1-an de aŭgusto, oni ankaŭ malfermis la akceptejon en Gaumont Palace; kaj vidante ke oni ornamis la tribunon per kreskantaj floroj, miaj dubemaj antaŭpensoj kvietiĝis, kaj mi ĝojiĝis je la certigo, ke nia kongreso do malfermiĝos la proksiman tagon. Mi nun trairis la belegan konstruaĵon, kun ĝojo imagante ke entuziasmaj esperantistoj baldaŭ plenigus tian grandiozan halon. Ĉie estis dikaj tapiŝoj por moderigi bruajn paŝojn; ĉio estis vere eleganta. Ankaŭ la vastaj koridoroj estis kovritaj per molaj tapiŝoj kaj provizitaj je salikseĝoj; tie ĉi oni bonege povus ĝui la konversacion kun amikoj el fremdaj landoj! Certe neniu alia kongreso kapabla prezenti al siaj anoj tiel elegantan, grandiozan kaj tamen komfortan kunvenejon. Ĉio estis harmonia! Orientiĝante mi trarigardis

la programon. Kiel zorgeme oni aranĝis ĉion! Mian veran komplimenton al la kongresa komitato! Oni komprenis, ke oni estos “en bona societo”; devus esti ĉarmaj tagoj, kiujn ni travivus!

Sed tute alie ĉio okazis! Kiam posttagmeze mi forlasis la subteran fervojon (metroo) por iri al mia hotelo, mi observis starante ĉe la elirejo de l'metroo militiston kun bajoneto sur la pafilo. Nun mi komprenis, ke la malfeliĉa situacio, kiun ni estis kredinta, ke oni povus eviti, nun estas veninta kun terura potenco. Nun ni ankaŭ rimarkis afiŝojn, kiuj anoncis ĝeneralan mobilizadon, kaj alian afiŝon, kiu donis informojn al la fremduloj, kiuj estas en Francujo. Dum la vespero ĉiuj veturiloj ĉesis veturi; sed ĉar ni tiun vesperon atendis niajn amikojn el Danlando, ni iris la “Gare du Nord” pensante, ke eble ili povus alveni per la vagonaro. En la stratoj ni rimarkis multajn homojn, kiuj iris al la stacidomo prenante siajn kofrojn. Sed alvenante al la stacidomo, mi observis ke ĝi estas fermata kaj ekokupataj de la militistoj.

Malfrue – eble neniam – mi forgesos mian unuan impreson de la ĝenerala mobilizado kaj la malfeliĉulojn – malriĉaj hebreoj, poloj kaj rusoj supozeble – kiuj sidis sur siaj malriĉaj posedaĵoj, pretaj forlasi Parizon, se ili nur prosperus. Kiam ni petis permeson iri en la stacidomon por akcepti niajn samideanojn, oni respondis, ke neniu vagonaro plu transiros la landlimon. Ni tiam hejmeniris, kaj dum la sama nokto

ni preparis niajn kofrojn, por ke ni povu vojaĝi la proksiman tagon, la dimanĉon. Sed unue ni intencis viziti la danan konsulejon, kaj li diris al ni, ke estus absolute nekonsilinde tuj forlasi Parizon, ĉar multaj personoj jam amase alkuris al la landlimoj, kaj la vagonaroj ne funkcios plu. Ni do decidis resti. Nun ni – kiel ĉiuj fremdlandanoj – devis ekhavi nian “permis de séjour”. Pasis tri tagoj.

Provizitaj de la konsulo de pasporto, kiu estis subskribota de la hotelestro kaj de la polikomisaro, ni iris al la prefekto por ricevi nian permeson de restado. La kontoroj, al kiu miaj tri kunvojaĝantinoj kaj mi devis iri, provizore estis aranĝita en lernejo, kiu staras en mallarĝa strato. Tie ĉi staris homoj centope el ĉiuj nacioj, eŭropanoj kaj homoj el aliaj mondopartoj; ni staris sur la trotuaro ekster la lernejo sen sufiĉaj kontrolistoj. En la prefektejo oni laboris treege malrapide, kaj post 6 horoj ni nur avancis mallonge, tiam unu el la danaj sinjorinoj svenis; kaj dum bonfaremaj homoj sur la alia flanko de la strato helpis ŝin, mi iris al la konsulo por rakonti al li, kiel malfeliĉaj ni estas. Mi demandis, kio povus okazi, se ni ne ricevus la permeson de restado, kaj li respondis, ke estas absolute necese, ke ni ĝin havu, ĉar se ne, estus neeble por ni forlasi la landon, kaj oni eĉ volos aresti nin. Nu, ni do la proksiman matenon ekde la 6-a horo laŭvice atendadis; tiun ĉi tagon la kontoro translokiĝis al pli freŝa strato, sed ankaŭ tie ĉi estis nur tre malmultaj kontrolistoj kaj centoj da fremduloj; ankaŭ tie ĉi nur treege malrapide oni avancis.



Bildkarto kun reklamo de la 10-a Universala Kongreso montras la antaŭviditan kongresejon, Gaumont Palace en Parizo, ĉe la angulo de rue Caulaincourt et rue Forest, proksime al Place Clichy en la 18-a arrondissement. – Aliĝis 3700 Esperantistoj por la evento, inter ili 2500 eksterlandanoj. La aranĝo estis modele preparita. Karavanoj de rusoj, germanoj, angloj jam forvojaĝis, kaj alveninte al Parizo la 1-an de aŭgusto. – Oni mal-konstruis “Palaco Gaumont” en 1972 por la konstruado de hotelo, kiu situas proksime al Place Clichy.

La tutan tagon ni staris sur la strato kaj batalis por eviti, ke aliaj pli fortaj personoj nin malantaŭenpuŝu; sed ni tute ne prosperis pri tio, eĉ se ni estis starantaj 11 horojn en la strato. La proksiman matenon je la 6-a horo ni ree estis ĉe la kontoro; sed tiam jam

staris centoj da homoj tie, kaj kvankam sufiĉaj kontrolistoj ĉeestis tiun tagon, ni komprenis – laŭ niaj spertoj de la aliaj tagoj – ke ni ne sukcesus ekhavi nian permeson de restado, eĉ se ni starus la tutan tagon. Ni “kapitulacis” kaj iris al la konsulo klarigante al li, ke ni ne plu intencas laŭvice atendadi, eĉ se oni nin arestus aŭ pafus. La konsulo konfesis, ke persone li vidis kiel maloportune la afero estis aranĝita, kaj ke oni nun komprenas, ke estus neeble aranĝi la aferon tiel, kiel oni unue postulis; nun ni nur bezonas nian pasporton kun la subskribo de la polickomisaro. Ni do tute senutile travivis du vere malagrablajn tagojn en Parizo.

Ankaŭ alimaniere – sed tute kompreneble – ni spertis la mobilizadon: estis treege malsufiĉa limigita veturado de l'metroo, neniu varma akvo en la hoteloj, la prezoj en la restoracioj plialtiĝis, ni ne ricevis buteron kaj nur iomete sukeron. Telegramoj oni devis france formuli kaj ĉe la polickomisaro ricevi permeson ili forsendi. Telefone nur estis permesate paroli france; unu tagon, kiam ni telefonis al la dana konsulejo kaj parolis dane, la centralo postulis: Bonvolu paroli france. Oni povis interŝanĝi monon, sed ankaŭ por atingi tion, oni estis devigataj stari en la strato. Dana esperantisto atendis 5 horojn en la strato! Se oni intencis vojaĝi per la fervojo oni ankaŭ dum horoj atendadis en la strato kaj tiam ricevis numeron, per kiu oni la proksiman tagon havis la rajton aĉeti fervojbiletojn.

Dume ni renkontiĝis kun aliaj danaj samideanoj, kaj nia malgranda kolonio, entute 9 anoj, ekloĝis en la sama hotelo, kie ni vivis prudente ŝparemaj, ĉar ni ne sciis, kiom longe ni estos devigataj resti en Parizo. Cetere ni pasigis la tagojn kun longaj promenadoj, kaj unu aŭ du fojojn ĉiutage ni faris viziton al la dana konsulejo, por

demandi ĉu estus eble por ni vojaĝi, kaj iom post iom ni estis iomete senpaciencaj. Fine la konsulo opiniis, ke la tempo estas oportuna por nia hejmveturado, kaj ni forlasis Parizon nokte inter la 13-a kaj la 14-a de aŭgusto. Ni estis provizitaj je multaj skribaĵoj, i.a. de la dana kaj la angla konsuloj en Parizo, kaj post tre laciga kaj malrapida vojaĝo ni alvenis al Boulogne sur Mer. Ni iris al la vaporŝipo, kiu veturus al Falkstone en Anglujo, sed oni anoncis ke niaj pasportoj estos esplorataj de la prefekto. Nun ni rapide marŝis ĝis lia kontoro, sed ĝuste kiam ni alvenis al la pordego, la prefekto forlasis la prefektejon aŭtomobile; kaj la kontoron oni fermis ĝis post la forvojaĝo de la ŝipo! Oni konsilis nin atendi ĝis la venonta tago aŭ provi, ĉu oni donus al ni permeson vojaĝi per la ŝipo, kvankam la prefekto ne esploris niajn pasportojn. Nun ni rapidis al la ŝipo, kie oni aprobis niajn pasportojn. Per la vagonaro ni veturis al Londono, kie nia dana generalkonsulo aranĝis nian vojaĝon tra Leith en Skotlando, longa malrekta vojo. Per dana ŝipo ni estis forvojaĝontaj de Leith, kie ni denove devis havi skriban permeson de la dana generalkonsulo vojaĝi per la dana ŝipo. Por la lasta fojo ni ree estis skribataj en ŝiplisto. Vespre la ŝipo “A.P. Bernstorff” levis la ankrojn, kaj post unu kaj duona tagnokta ŝipvojaĝo ni alvenis al Esbjerg. Tiu ĉi parto de la vojaĝo estis ĉiumaniere bonega, kaj ni admiris, ke DFDS dum tiu danĝera epoko lasas sian novan kaj treege belan ŝipon prizorgi la iradon inter Danlando kaj Skotlando.

Merkredon la 19-a de aŭgusto ni ree metis niajn piedojn sur dana tero en Esbjerg, kaj ni estis dankemaj revidi nian patrolandon. Kvankam nia vojaĝo estis vere interesa, espereble neniam denove Esperanto-kongresvojaĝontoj travivos tian epizodon.



Profetaĵoj pri Martinus 4

La profetaĵoj de Nostradamus

de Ole Therkelsen

1. Nostradamus pri la Viro de la Nordo

En 1933 Martinus sukcesis enpreni vicon da artikoloj sub la titolo *Ĉe la turnopunkto* en la n-roj 2-12 en la periodaĵo "O.M." (*Okulta Magazino* – la Skandinavia Revuo de Moderna Okultismo). Ĉi tiuj artikoloj poste en 1962 estis kompilitaj en la libron *Menneskehedens skæbne* [La sorto de la homaro]. En la unua numero de O.M. estas enkonduka artikolo pri Martinus: *Ĉu la viro el la Nordo? kun la subtitolo Martinus havas la kosman-klarvidan kapablon*.

La redaktoro skribas: "Per Nostradamus ni aŭdis pri 'la Viro de la Nordo'. Li fariĝis koncepto kiu grade alkroĉiĝis en nia konscio, kaj ne tute senkaŭze ĝuste en ĉi tiuj tempoj, kiam grandaj aferoj estas atendataj, ni aŭdacas interrilatigi la nomon Martinus kun tiu plurjarcenta profetaĵo."


2. Fortega religia proklamo pri la fina venko de la instruo de Kristo estas antaŭdestinita origini el Danio

Nostradamus (Michel de Nostre-Dame) estis franca kuracisto, astrologo kaj viziulo de juda deveno, kaj vivis dum la tempo 1503-1566. En iom malpli ol mil kvarliniaj strofoj grupigitaj en dek centopojn li notis longan vicon da profetaĵoj kaj antaŭdiroj pri la estonteco de Eŭropo dum la sekvaj 500

jaroj, kiujn li travivis en la formo de vizioj aŭ revelacioj. La dana direktoro, inĝeniera kapitano C.S. Billenstein (1860-1952) skribis la libron *Opklaringen af Nostradamus' Profetier* [La Klarigo de la Profetaĵoj de Nostradamus (KPN)], kiun li publikigis en privata eldonejo ĉe vojo Vejlesøvej, urbo Holte. La antaŭparolo estis finita la 25-an de aŭgusto 1920, do nur 7 monatojn antaŭ ol Martinus ricevis kosman konscion en marto 1921. Ĉi-sube estas cititaj la unuaj linioj el la enkonduko de la libro. Billenstein: "Oni ĉiam rigardis la profetaĵojn de Nostradamus kiel strangan kaj mistikan libron kaj antaŭvidis ke ĝi alportos surprizojn. Troviĝas en la profetaĵoj diversaj eldiroj kiuj nepre devas interpretiĝi tiudirekte, sed ke ilia destino estus *komuniki al la mondo fortegan religian proklamon pri la fina venko de la instruo de Kristo*, ke tiu estus destinita aperi en la jaro 1920, kaj ke per la apero de la profetaĵoj estis destinite ke la proklamo okazu unue en nia malnova, dana patrio, ĉio tio certe longe superpasas kion eĉ la plej aŭdaca fantazio kapablus imagi." (*La klarigo de la profetaĵoj de Nostradamus*, paĝo 9).

3. Reformado de la kredo je la mondogo

Billenstein en sia libro rimarkigas ke li klarigis la profetaĵojn en la stranga malnova libro de Nostradamus, eldonita



Portreto de Nostradamus

Reproduktaĵo de kupra gravuraĵo kun la subskribo "Poize Delineavit et Sculpsit". La originalo havas surskribaĵon "L'observ. Méd. Tom. 8", kiu montras ke estas ilustraĵo aparteninta al grava medicina periodaĵo.

dum la jaroj 1555-1558. Li opinias ke ĉi tiuj profetaĵoj estas proklamo de reformo de la kredo, kiu daŭrigos la reforman movadon komencitan de Martin Luther (1483-1546). (La nomoj de la du reformantoj, Martin kaj Martinus, estas derivaĵoj de Marso, kiu interalie reprezentas revolucion). Laŭ la interpreto de Billenstein la mesaĝo estas portota al la konfeso de la norda kredo kaj klarigota kadre de la areo de la evangelia-luterana eklezio. La nia-tempa konscia kaj granda defalado el la kredo antaŭiros la finan venkon de la instruo de Kristo. Samtempe la homojn plagos militoj kaj malfeliĉoj, neeviteblaj sekvoj de iliaj malobservoj. Laŭ Billenstein la profetaĵoj do estas proklamo de

la mondfina juĝo, tiel klara kaj unusenca ke ne eblas bagateliĝi ĝin. Grandaj bataloj kaj militoj inter la islama kaj okcidenta mondoj okazados ĝis la jaro 2034.

Malgraŭ la malĝojigaj avertoj pri suferoj, detruado kaj mondmilitoj dum nia tempo, la profetaĵoj estas atesto ke ekzistas eterna dia justeco, kiu ĉion gvidas kaj kondukas. Konfide al la ĉiopova providenco oni fidoplene povos iri renkonte al la estonteco.

La profetaĵoj de Nostradamus estas vortigitaj en tiel kriptaj esprimoj ke ili normale estas kompreneblaj nur longe post la efektiviĝo de la eventoj. Nome la intenco ne estas ke ni anticipu sciuj pri la okazontaĵoj, sed ke ni poste povu vidi la profetaĵojn kiel ateston de la diaj plano kaj direktado, kiuj estas malantaŭ ĉio.

Billenstein: "La aferoj sciigitaj al ni per la profetaĵoj estas dia revelacio, kaj ĝi estas donita al

ni en ĉi tiu stranga formo por ke ni sentu nin konvinkitaj pri ĝia ĝusteco. Ni ekkonos ĝian veron kaj tiel estos venigitaj al la kredo je tio kion ĝi anoncas pri nia rilato al Dio." (KPN paĝoj 13-14).

Laŭ Billenstein la profetaĵoj instruas al ni ke ni havas agadliberecon kaj intelekton por povi evoluigi nian animon. Diversaj homaj kaj ekleziaj klarigoj, dogmoj, ceremonioj kaj aranĝoj povas kunhelpi forigi la respondecon de la unuopulo antaŭ Dio. Sed la unuopulo devas agnoski sian respondecon kaj sekvi sian konsciencon, kiu ne bezonas aliajn leĝojn krom la dek ordonoj de Sinajo kaj la diskonigo de Kristo pri la grandaj ordonoj ami Dion kaj la proksimulon.

4. La fina venko de la instruo de Kristo – la perfektigo de la kristanismo

La vortoj de Billenstein, ke el Danio eliros grandega religia proklamo kondukanta al “la fina venko de la instruo de Kristo”, estas tre interesaj rilate al la vortigo de Martinus mem pri “la perfektigo de la Kristanismo”. Per siaj vizioj dum la Pasko de 1921 Martinus iĝis tagkonscia pri tio ke lia vivo estas konsekrita por *perfektigi la kristanisman* per logikaj kaj sciencaj analizoj en nova spirita scienco. (Vidu par. 1.7).

Martinus skribas cetera: “La unua parto de ĉi tiu kosma travivada stato estis rekta kristovizio kiu montris al mi ke la dia lumo de la kristanismo en sia daŭrigo kaj ama strukturo revelaciĝos per mi al la homaro. [...] Mi en ĉi tiu mia fizika enkarniĝo prezentos la plej altan scion, la pludaŭrontan kristanisman, la eternan lumon, la ĉioamon, “la bildon de Dio” antaŭ la tera homaro. [...]”

Sed nun venis la tempo kiam la homoj komencas avidi la siatempe retenitan kaj interrompitan dian sci-revelacion de Jesuo Kristo. Kaj tio estis la scio nun intelektigota kaj iĝonta renovigo kaj bazo de la monda misio de la kristanismo kiel vivfundamento de la nun ekestanta nova mondepoko. Kaj estis tiu intelektigo kaj renovigo de la kristanismo kiu estis komprenebligita al mi per kosma konscio kaj transdonita al mi por plenumi.” (*La Intelektigita Kristanismo*, par. 2).

5. Nostradamus, la Keopsa piramido kaj Martinus

Billenstein en 1920 en sia klarigo de la profetaĵoj de Nostradamus ektuŝas ke Nostradamus sugestas rilaton inter la Princo de Danio kaj la granda piramido de Egiptio.

Salon, Mansol, Tarascon de Sex, l'arc
Où est debout encor la pyramide,
Viendront liurer le Prince Dannemarc,
Rachat honny au temple d'Artemide

Nostradamus strofo IV. 27

Salon, Mansol, Tarascon de Sex, la arko
kie la piramido ankoraŭ staras, venos
elaĉeti la danan princon, mokitan en la
templo de Artemiso.

La kvin unuajn vortojn Nostradamus karakterizas per la loko kie li loĝis. La arko kie ankoraŭ staras la piramido, estas la delto de Nilo ĉe la Keopsa piramido. La templo de Artemiso same kiel la piramido estas unu el la sep mirindaĵoj de la antikva mondo. – La signifo de la strofo do fariĝas tiu ke Nostradamus kaj la Keopsa piramido rehonorigos la danan princon el la moko kiun oni kaŭzos al lia postmorta reputacio. (*La Klarigo de la Profetaĵoj de Nostradamus*, KPN, paĝo 128).

Se oni interpretas Martinus-on kiel danan princon en spirita kampo, eblas diri rilate al lia postmorta reputacio ke la publiko kaj la scienco mokas Martinus-on, kaj iuj ekleziaj kristanoj nomas lin falsa profeto.

En alia el la kvarliniaj strofoj de Nostradamus, IX.33, menciigās la reĝo de Romo kaj la reĝo de Danio (Roy de Rome & d'Annemarc) lige kun iuj tumultoj. Povas esti malfacile interpreti ĉi tiun strofon, kredeble la Papo (reĝo de Romo) apenaŭ anatemos Martinus-on (la reĝon de Danio), sed kiam *La Tria Testamento* estos pli disvastigita kaj tiamaniere havos pli da influo, oni devos kalkuli kun konsiderinda maltolerado kaj rezistado de religia flanko, eble el katolika flanko. (Vidu eventuale LB1, par. 145).

Laŭ Billenstein okazos batalo inter reforma movado kaj la katolika eklezio. Ĉi tiu reforma movado post la militoj



Murtapiŝo kun la sfinkso kaj la piramidoj en la sidĉambro de Martinus

2009-2034 ankaŭ penetros ĉe la ne-kristanoj kaj kondukos al paco kaj konkordo sur la tuta tero. Billenstein do opinias ke la islamanoj tiutempe ankaŭ komencos alpreni la novan kredon, kiu kontribuu al la kreo de paco. (KPN, paĝo 86).

La ŝijaaj islamanoj parolas pri dekdua profeto aŭ pri Mesio ne videbla. Iamaniere oni ja povas diri ke Martinus estis nevidebla profeto, ĉar li restis nekonata dum sia vivotempo. Decida estas ne la persono, sed tio kion li skribas.

6. La nova leĝo aŭ la nova kredo

Iusence Nostradamus, la piramidoj kaj Martinus ankaŭ estas kombinitaj en la sidĉambro de Martinus. Martinus havis la piramidojn sur la muro kaj la libron de Billenstein pri Nostradamus en sia eta libraro. (Kun paso de la tempo Martinus ricevis donace nombron da libroj).

Martinus precipe ĝojis pri la ĉapitro de Billenstein pri “la nova kredo” eliranta el Danio. Billenstein tradukas la francan vorton “loi” per “kredo” anstataŭ “leĝo”. Se tio estu indiko al la Spirita Scienco de Martinus, la rekta traduko “la nova leĝo” estus la perfekta termino. La Spirita Scienco nome malkovras la eternajn leĝojn kaj kosmajn principojn malantaŭ ĉia vivesprimiĝo.

Billestein: “Venos nova leĝo, tio estas nova kredo, kiu metos nin en pli naturan kaj pli personan rilaton al Dio kaj simpligos la kultadon”. (KPN, paĝo 154).

En la strofo VIII.6 de Nostradamus aperas la esprimo “la skribaĵo de la mortinto”, kiu povus sugesti ke la verko de Martinus nur post lia forpaso estos malkovrita – publike kaj internacie.

En la traduko de Billenstein la strofo jenas: “Kiam estos trovita la



La memorĉambroj de Martinus
La sidĉambro de Martinus, kiu hodiaŭ estas muzeo

skribaĵo de la mortinto, kiam la malnova *cave à lampe* estos liberigita pri sia kovraĵo, kiam la leĝo estos provita de la reĝo kaj la ulpana princo, la reĝa domo kaj la gvidanto venos sub la glazuron". (KPN, paĝo 154).

Tio ja estus interpretebla tiusence ke iam en la estonteco, kiam la verko de Martinus estos konata kaj la kaŝita lumo estos malkovrita, tiam ĝi havos la plej altan agnoskon.

Lige al strofo pri religiaj moroj (V.16) laste estu menciite ke Nostradamus skribas ke iam ĉesos la sabea strangiĝo cindrigi la mortintajn homkorpojn. (KPN, paĝo 163).

Traduko Jens Stengaard Larsen 2013



Martinus 12

La agnoskemo de la homaro rilate al la nova mondimpulso 4

de Erik Gerner Larsson

Dum la reprezentantoj de la unua kategorio en grupo A dank' al ilia evoluita sento- kaj inteligentvivo enkreskis en zonon, kiun Martinus karakterizas kiel “la zono de nefekundeco” pro tio, ke ĉiu dezirego rilate al enamiĝo kaj edziĝo ĉi tie estas forpasinta kaj cedanta al vivo en la servado de pli altaj principoj – tiam la afero estas alia por la reprezentantoj de la dua kategorio en grupo A. Ĉi tie tre granda parto de la sentovivo estas ligita de la enamiĝenergioj, kiuj tiam denove manifestiĝas kiel dezirego al edziĝo kaj familia vivo kun apartenantaj al tio efikoj, feliĉaj kaj malfeliĉaj.

Sed ju pli homo estas ligita al ĉi tiuj deziregoj, des malpli da sentovivo liberigas kaj disponigas al spiritaj interesoj. Sed homoj, kiuj troviĝas inter la kadroj de ĉi tiuj diritaj kategorioj, estas homoj, kiuj troviĝas en zono de la evoluo, kie la seksa vivo travivas grandan kosman metamorfozon. Ni ankaŭ ĉi tie konstatas, ke la edziĝ-principo estas degeneranta. La edziĝoj estas ofte supraĵaj kaj malfeliĉaj. La homo en ĉi tiu zono komencas fariĝi netaŭga kiel edzo aŭ edzino, ĝi atingis la limzonon inter la besta kaj homa seksualismo.

Por homo, kiu ne okupis sin pri tiuj demandoj, eble ĉi tiu povas soni strange, sed kiam oni memoras, ke la surtera homo ankoraŭ ne estas identa je la

plene evoluita aŭ kosme konscia homo, sed disiĝas de ĉi tiu ankoraŭ apartenante al la besta regno. La surtera homo estas ankoraŭ mambesto kaj vivas sub ĝiaj leĝoj rilate al sekso, fekundiĝo kaj generado.

La kosme konscia homo kontraŭe vivas sub tute aliaj seksaj leĝoj, ĉiuj seksaj fortoj estas transformitaj en ĝi al emoj, kiuj kaŭzas, ke ĝia tuta vivo kaj agado reprezentas unu grandan obeadon al la leĝo de estado, t.e. la leĝo pri amo al la proksimulo, kiu denove efikas, ke ĝi prezentas staton de konscio, kiu estas tute senigita de posed-rajto kaj ĵaluzo, plej bone komparinda je suno, kiu per siaj varmaj radioj vivigas la ĉirkaŭaĵojn. La amemo de la kosme konscia homo igas Dion fakto al ĝiaj ĉirkaŭuloj.

La diferenco inter ĉi tiuj du homtipoj estas, ke dum la surtera homo pere de sia seksualismo kontinuas emojn, kiuj ligas lin al la besta regno, tiam la kosme konscia homo pere de sia seksualismo kontinuas tiujn ecojn, kiuj interligas lin al la vera homa regno. Malantaŭ ĉiu formo de kreado seksualismo tiel estas la kaŭzo. Seksualismo estas la kerno de “la dia kread-principo” kies analizo sub la nomo de “la plej alta fajro” aperos en unu el la sekvantaj volumoj de “La Libro de la Vivo”. (Vidu Livets Bog §130).

Traduko Margrethe Noll en 1939

Kiel Martinus verdigis mian vivon

de Hokan Lundberg



Ĉi tiu artikolo temas ĉefe pri kiel la dana verkisto Martinus influis mian vivon. Dank' al lia verko mi iĝis vegetarano kaj ankaŭ esperantisto. Sed kiel enkondukon mi volas iom priskribi la vivon de Zamenhof.

Tri fazoj de Zamenhof

Kiam Zamenhof, nur 58-jara, sentis ke proksimiĝas la fino de lia surtera vivo, li komencis verki artikolon pri kiel lia religia kredo ŝanĝiĝis dum la vivo. La sekvaj citaĵoj venas de tiu artikolkomenco:

“En mia infaneco mi kredis je Dio kaj je senmorteco de la animo en tiu formo, en kiu instruis mia denaskiĝa religio. Mi ne memoras tute precize en kiu jaro de mia vivo mi perdis la religian kredon; sed mi memoras, ke la plej altan gradon de mia nekredado mi atingis ĉirkaŭ la aĝo de 15-16 jaroj.”

“Ĉio, kion mi nun skribas, naskiĝis en mia kapo ne nun, sed antaŭ kvardek jaroj, kiam mi havis la aĝon de 16-18 jaroj; malgraŭ ke mi de tiu tempo multe meditis kaj legis diversajn sciencajn kaj filozofiajn verkojn, miaj tiamaj pensoj pri Dio kaj pri senmorteco preskaŭ tute ne ŝanĝiĝis.”

“Dum en la mondo scienca mi perdos ĉian estimon, mi samtempe en la mondo de kredantoj trovos nenian kompensan simpation, verŝajne nur atakon, ĉar MIA kredo estas tute alispeca ol ILIA kredo... Estus pli prudente, se mi silentus, sed mi ne povas.”

Zamenhof ne sukcesis fini la artikolon pro sia malsano. Sur alkroĉita slipo troviĝis la verŝajne lastaj skribitaj vortoj

de Zamenhof:

“Mi eksentis, ke eble morto ne estas malapero ...; ke ekzistas iaj leĝoj en la naturo ...; ke io min gardas al alta celo ...”

Resume eblas diri ke Zamenhof trairis tri religiajn fazojn en sia vivo: 1) kiel infano li havis sian denaskan religion, la judismon – 2) kiel junulo li iĝis nekredanto aŭ ateisto dum kelkaj jaroj – 3) li poste ekhavis ian neŭtralan kredon je senmorteco kaj Dio. Tiu lia kredo restis en li dum la resto de lia vivo kaj certe instigis lin labori por pli bona mondo diversmaniere i.a. per Esperanto kaj la Homaranismo.

Fazoj ne maloftaj

Verŝajne estas pluraj kiuj iom rekonas la fazojn “infana kredo”, sekvanta “materiismo” kaj poste malfermiteco al “ia neŭtrala kredo” sed sen emo aparteni al iu religio. Laŭ la analizoj de Martinus pluraj havas ĝuste tiajn periodojn en sia vivo kaj simile estis por mi: kiel infano mi havis ian kristanan kredon, kiel adolesko mi estis ĝisosta ateisto kaj poste mi ekhavis intereson pri spiritaj aferoj sed tute ne volis eniri iun religion. Tiu intereso ekestis kiam mi, pro hejmtasko en la gimnazio, devis elekti kaj legi tekston religian aŭ spiritan kaj poste iom skribi pri ĝi. Leginte la libron “Kosmaj lecionoj” de Martinus, laŭ rekomendo de mia patro, mi kun entuziasmo skribis pri ĝi kaj fiere donis la rezulton al mia instruisto de religio. Poste mi volis scii pli pri la mondbildo de Martinus kaj plulegis liajn librojn, i.a.

“Livets Bog” (La Libro de la Vivo), “La sorto de la homaro” kaj “Tra la pordo de la morto”.

Vegetara vivo

Ne multajn semajnojn daŭris ĝis kiam mi estis konvinkita ke ne bonas manĝi viandon, pro influo de libroj kaj artikoloj de Martinus. Familianoj kaj amikoj miris, sed komprenis ke mi estas serioza pri mia decido vegetare manĝi. Ekde tiu tago kiel 19-jarulo mi neniam manĝas viandon, fiŝojn aŭ marbestojn. Komence mi provis iom propagandi en mia ĉirkaŭaĵo por vegetara manĝado, sed rapide rimarkis ke tio ne donas bonajn rezultojn. Studante la analizojn de Martinus pri la vivo mi akceptis ke ĉiuj sekvu siajn inspiron kaj deziron kaj ke ekstera influo eblas nur se la koncerna persono mem volas ricevi konsilojn. Dum kelkaj jaroj mi ankaŭ veganumis, sed tio ne havis tute bonan efikon al mia korpo. Mi perdis tro da pezo kaj ĉiutage estis ia skuado en kelkaj muskoloj. Tiutempe mi ne estis preta por vegana manĝado, mankis kaj nutraĵaj konoj kaj spertoj kuiri vegane. Nun, pli ol 20 jarojn poste, mi ŝatus denove esti vegano sed konstatas ke kuir- kaj gustokutimoj povas esti fortaj bariloj, ne nur por viandomanĝantoj! Ekologiaj lakto-ovo-produktoj ankoraŭ sufiĉas por trankviligi mian malbonan konsciencon rilate al la suferoj de bestoj. Sed mi scias ke iam bonus transiri al vegana manĝado.

Rilato al bestoj kaj nia korpo

Kio en la libroj de Martinus igis min ŝanĝi al vegetara manĝado? Estis pluraj aferoj, interalie tio ke la analizoj de Martinus montras ke indas eviti suferigi aŭ esti parto de suferigado de aliaj vivaj estuloj kaj ankaŭ ke la plantoj ne spertas suferadon samgrade kiel faras la bestoj. Do, el suferiga vidpunkto plej bonas manĝi vegane. Alia afero estis liaj priskriboj pri nia fizika organismo, kiel

ĝi ne plu estas adaptita por nevegetara manĝo. En la libreto “La ideala nutraĵo” ekzistas analizoj pri kiel nutroelementoj sorbiĝas de nia korpo kaj klarigoj ke viandaj manĝaĵoj en longa perspektivo malbone influas nian korpon. Nia korpo konsistas el multegaj “mikroestuloj” kiel ekzemple niaj organoj kaj ĉiuj ĉeloj. Kiam niaj ĉeloj alfrontas la energion de la viandoĉeloj ekestas ia malharmonio kiu malbonas por ni longperspektive. (Por doni detalan klarigon pri tio necesus multe pli longa artikolo.) En la sama libro Martinus ankaŭ traktas kial evitindas uzi tabakon, alkoholon kaj aliajn drogojn, klarigante ke tiaj substancoj malfortigas ne nur la fizikan organismon sed ankaŭ la spiritan strukturon de la individuo.

Vivon post vivo

Eblas argumenti ke viandomanĝado tute bone taŭgas por homoj kaj ke eblas longe kaj bone vivi kiel viandomanĝanto. Tio estas ĝusta se oni rigardas nur unu surteran vivon. Sed Martinus montras en sia verko ke la interna kerno de ĉiu viva estulo estas *eterna* kaj do transvivas la morton de la fizika organismo. Laŭ Martinus viva estulo konsistas el tri “principoj” kiuj estas kunligitaj en nedisigebla triunuo. Tiu triunuo enhavas: kreanton (la eternan kaj nematerian mion), kreokapablon (ian superkonscion kun i.a. talentkerno kaj maskla kaj femala polusoj) kaj kreitajn aferojn (i.a. la tagkonscion, niajn talentojn, la fizikan korpon, la spiritajn korpojn ks). Kiam nia fizika korpo ne plu povas porti nian tagkonscion, ekzemple pro severa akcidento aŭ malforteco rilate al alta aĝo, ni forlasas la ne plu funkciantan korpon kaj ankaŭ la fizikan mondon portempe. Tiam nia konscio transiras al korpo kiu apartenas al nia spirita strukturo kaj konsistas el radiforma materio (ia elektra energio). Simile estas kiam ni dormas, sed kun la diferenco ke tiam

nia mio daŭre havas kontakton kun nia fizika korpo kaj pro tio nia konscio povas rapide reveni al ĝi (kaj ni vekigās). Do, kiam ni “mortas” ni fakte ne mortas, sed simple niaj mio kaj konscio forlasas nian fizikan korpon kaj transiras al korpo radiforma en la spirita sfero. “Mortinte”, post agrabla ripozado en la spiritaĵoj dum kelkaj aŭ multaj jaroj, ni denove estas pretaj reenkarigi por daŭrigi nian evoluon al iĝi “fina homo” tute sen bestaj aŭ egoismaj trajtoj. Ni homoj surteraj ĝenerale ne povas bone taksii kiuj manĝaĵoj estas tute taŭgaj por ni el plurviva vidpunkto. Sed dank’ al ripetaj enkarniĝoj en la fizika mondo ni plu kaj plu evoluas morale, inteligente, saĝe kaj diverstale. Laŭ Martinus homo ĉiam enkarniĝas kiel homo, hundo ĉiam kiel hundo ktp, sed la fizika planedo povas malsami de vivo al vivo. Ĉiuj specioj havas sian evoluojon. Ni homoj surteraj preskaŭ forlasis la bestan regnon, sed ankoraŭ havas multajn bestajn trajtojn en ni mem.

En la estonteco

Martinus priskribas ke la homaro iom post iom forlasos militadon, mistraktadon, suferigadon ks kvankam ankoraŭ restas multe da teruraĵoj sur la tero antaŭ ol la homaro atingos pli altan evoluŝtupon – la tiel nomatan “veran homregnon”. Sed ni jam survojas al tiu pli alta stadio, forlasantade la bestan regnon. Ĝis nun ĉefe la teknika evoluo estis tre rapida, la morala evoluo de la homaro ne estis same rapida. Pro la teknika kaj inteligenta evoluo la militoj iĝis pli teruraj kaj grandskalaj ol iam ajn en la historio. Sed i.a. pro ĉiuj militoj kaj el ili venantaj katastrofoj, la homaro spertas grandan suferadon, kaj ĝuste la suferado puŝas la moralan evoluon antaŭen. Estonte kaj la teknika evoluo kaj la morala evoluo de la homaro estos multe pli progresintaj ol hodiaŭ kaj tiam ĉiuj homoj manĝos vegetare aŭ vegane.

Iam establiĝos mondregistaro kiu superrigardos ĉiujn komunajn valorojn de la tero. Ĝi kunordigos ĉiujn naciojn kaj certigos ke ne plu okazos armilaj konfliktoj. En tiu tempo verŝajne kaj Esperanto kaj la verko de Martinus havos gravan rolon, i.a. en la lerneja sistemo. Miatakse Esperanto, la mondbildo de Martinus kaj la Unuiĝintaj Nacioj donos bazon por nova internacia mondregno, iam floranta sur nia bela planedo en la estonteco. Ni vidos, sed ne ĉi-vive sed en venontaj vivoj, ĉu plenumiĝos la Zamenhofa revo, ke *“la homoj iam kunfandiĝos en unu neŭtrale-homan popolon”*. Martinus antaŭvidis ke post 3000 jaroj la homaro estos tute forlasinta la bestan regnon kaj vivos en “la vera homregno” plene en harmonio kaj kun nekondiĉa amo inter ĉiuj homoj.

Dankemo

Dank’ al la verko de Martinus mi fariĝis vegetarano kaj iom poste ankaŭ esperantisto i.a. pro tio ke la Instituto de Martinus subtenas Esperanton. Dank’ al Esperanto mi konatiĝis kun multaj interesaj kaj ĉarmaj homoj tutmonde, i.a. mia edzino Sonja Petrović el Serbio. Dum pluraj jaroj ni ambaŭ estis tre aktivaj en la Esperanto-movado i.a. en TEJO, E@I kaj lernu.net. Ni nun havas “verdan familion”, kun du infanoj, kiu manĝas vegetare kaj parolas i.a. Esperanton. Ne plu ni multe aktivis en la Esperanto-movado, sed venontsomere ni helpas organizi Esperanto-semajnon en Martinus-Centro en Danlando kaj tuj poste Renkontiĝon de Esperantistaj Familioj en Svedio. Vegetaranismo, la mondbildo de Martinus kaj Esperanto estas por mi bonega kombino kiu kreas en mi esperon kaj ankaŭ dankemon!

TEVA

Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio. Vivu kaj lasu vivi. TEVA havas novan belan hejmpaĝon, volonte vidu

<http://vegetarismo.info/>. – Tie vi povas legi i.a. pri la unua TEVA-kongreso kiu okazos julie en Slovakio (kadre de la aranĝo Somera Esperanto-Studado).

Somera kurso de Martinus-Centro en Esperanto

La 26-an de julio ĝis la 2-a de aŭgusto eblos kune kun aliaj esperantistoj studi la analizojn de Martinus. La kurso okazos en la Martinus-Centro de Klint, ĉemara urbeto kiu situas ĉ. 3 horojn for de Kopenhago, la ĉefurbo de Danlando. Al somera kursosemajno de la centro venas kutime ĉ. 200 homoj, ĉefe el la skandinavaj landoj sed dum kelkaj semajnoj estas instruado ankaŭ en la angla, germana, hispana kaj Esperanto. Krom prelegoj, studgrupoj, diskutrondoj kaj ĉemaraj promenadoj eblas bone manĝi kaj amikumi en la vegetara restoracio de la centro. Al la programo de la Esperanto-grupo kontribuos i.a. Jonas Dalmose, Mathias Dalmose, Henning Sato von Rosen kaj Hokan Lundberg. Por pli da informoj kaj prezoj, vidu www.martinus.dk aŭ skribu al esperanto@martinus.dk.

La supra artikolo estis verkita por la revuo de Tutmonda Esperantista Vegetara Asocio. Se vi ŝatus legi pli pri la du „pacosemajnoj” Zamenhof kaj Martinus, vidu http://hokanx.ikso.net/Zamenhof_kaj_Martinus.pdf.



Abonilo 2014: Senpage Eo-Kosmos

Senpage, du fojojn jare (en marto kaj oktobro) Eo-Kosmos publikigos en elŝutebla formato ĉe la adreso: www.martinus.dk/eo. Rete kaj retroŝte vi ankaŭ senpage povos aboni Eo-Kosmos kiel alkroĉitan pdf-dosieron. Sendu vian peton al la Eo-adreso de Martinus-Instituto: esperanto@martinus.dk.

Ne plu eblos pagi kaj aboni paperan version de Kosmos en Esperanto pere de makleroj aŭ UEA-konto. Sed laŭ speciala interkonsento vi povos aboni paperan Kosmos en Esperanto, se vi kapablas pagi rekte al bankkonto de Martinus-Instituto.

INFORMO PRI LA TRIA TESTAMENTO

La celo de la revuo Kosmos estas doni enrigardon en tiun mondbildon, kiun la verkisto Martinus (1890-1981) priskribis en vico da libroj kun la kumuna titolo: La Tria Testamento.

La mondbildo de Martinus estas logika analizo de la spiritaj leĝoj kaj principoj de la vivo. La nova mondbildo estas studebla per la libroj de Martinus, kiuj eldoniĝas de la Martinus-Instituto, kaj per prelegoj, kursoj, studrondoj kaj informoj en la interreto. Okazas aktivecoj en la Martinus-Instituto en Kopenhago, en la Martinus-Centro en Klint ĉe Nykøbing Sjælland, en aliaj lokoj en Danio kaj eksterlande. Pliajn informojn oni ricevas kontaktante la Martinus-Instituton. La disvastiĝo de la konoj pri La Tria Testamento okazas sen ia formo de membreco aŭ kreado de asocio.

Eldonanto: Martinus-Instituto
Mariendalsvej 94-96
DK-2000 Kopenhago
Tel: (+45) 38 34 62 80
fakso (+45) 38 34 61 80
Telefontempo:
 lundo-ĵaŭdo 13-16
 vendredo: 9-12
DK p.ĝiro 642-9580
www.martinus.dk
esperanto@martinus.dk
shop.martinus.dk

Redakcio: Ole Therkelsen (respondeca),
Mathias Dalmose kaj Jonas Dalmose.
Kompostado: Dan Elhåge.
La frontpaĝa bildo: © Miketant | Dreamstime.com

Abono: Jare 2 ekzempleroj
Prezo: DKK 100,00
Unuopa kajero: DKK 50,00

Kopirajto: © Martinus Institut
Redono de teksto nur lau skriba permeso.
Presita de Martinus Institut
ISSN 1600 4116.



Martinus-Centro, Klint

– internacia studcentro, ferio kaj retiriĝo

Martinus-Centro en Klint en norda Selando, Danio, estas internacia studcentro, kiu situas ĉe la maro en belnatura, paca loko ĉe la vilaĝo Klint ĉ. 110 km nordokcidente de Kopenhago. La plej proksima urbo estas Nykøbing Sjælland. Ĉi tie fondis Martinus en la jaro 1935 feriejon, kiu tra la jaroj evoluis al moderna kurso-centro kun prelegejo, kursolokaloj, vegetara restoracio, loĝejoj kaj tendumejo por kursanoj.

Kursoj pri la Mondbildo de Martinus

Oni povas partopreni kursojn, aŭskulti prelegojn kaj pere de memstudado enprofundiĝi en tiun mondbildon, kiun Martinus priskribis en sia tuta verkaro. En agrabla etoso oni povas studi la Kosmologion de Martinus en studgrupoj. Somere okazas ĉiutaga instruado en la dana kaj la sveda kun nova temo ĉiusemajne, kaj en certaj semajnoj ankaŭ estas instruado en la angla, la germana kaj Esperanto. (Petoj pri instruado ankaŭ en aliaj lingvoj estas bonvenaj). Printempe kaj aŭtune estas kursoj kun varia daŭro, kiuj donas eblecon profundiĝi en la analizojn de Martinus.



Speciala etoso

La centro estas paca oazo por spiritaj serĉantoj. Krome oni povas inspiriĝi de la luma kaj pozitiva atmosfero de la loko. Ĝi estas karakterizita de tio, ke la partoprenantoj volonte kontribuos al la evoluo de nova humana mondkulturo – en la spirito de Martinus.

Aliĝo

Aliĝo kaj mendo de loĝejo ĉe esperanto@martinus.dk aŭ telefono +45 59 30 62 80. Pli da informo ĉe www.martinus.dk/eo.



Martinus-Centro